Universala Esperanto-Asocio

KUNVEN' ALVEN'

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2018-02 sendita el Budapeŝto, la 21an de januaro.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# Evento-torento – kiel ĉiam!

En nia dua komuniko de la jaro, ni provas skizi kelkajn el la svarmo da proponoj pri eventoj – kongresoj, kunvenoj, kursoj, ekskursoj kaj seminarioj. En nia unua EKO de la jaro ni jam informis pri la 11a Mezorienta Kunveno en Marakeŝo. Jen kelkaj pliaj ebloj. Por pli plenaj informoj, vizitu la kalendaron de Eventoj: http://eventoj.hu/kalendaro.htm. Se vi mem organizas eventon, nepre zorgu, ke la rilataj informoj aperu en tiu kalendaro.

## En Francio

- ### Kulturcentro Bouresse (EF)

19a-23a de februaro: staĝo en pluraj niveloj (komencantoj, komencintoj, progresantoj). Gvidanto: Ansofi Markov. Studado en etaj grupoj, adaptita pedagogio, familieca etoso. Ebleco por ekzamenoj de FEI post la fino de la staĝo vendrede la 23an de februaro.

- ### Kulturcentro Greziljono

**De la 20a ĝis 28a de aprilo** 2018 okazos la 8-a **staĝo PRINTEMPaS** kun proksimume 40 partoprenantoj.

- Kurso A1-A2 gvidata de Marion Quenut (Tuluzo)
- Kurso A2-B1 gvidata de Christophe Chazarein (Tuluzo)
- Kurso B1-B2 gvidata de Zsófia Kóródy (Herzberg)
- Internaciaj KER-Ekzamenoj (27-28.aprilo)
- Prelegoj kun Nijole Stakeniene (Litovio)
- bona etoso kaj bonaj manĝoj (viande aŭ vegetare)

2018-majo-09/13 --- Korusa renkonto de *Interkant'*;  ReVe, Renkontiĝo Vegana
2018-julio-09/27 --- Maratona Esperanto-kurso dum ĝis 18 tagoj
2018-julio-16/21 --- Speciala semajno kun Turismaj vizitoj
2018-julio-21/27 --- Internacia E-Konferenco de OSIEK « Esperanto en Artoj »
2018-aŭgusto-11/19 ---  Festa Semajno por infanoj kaj familioj

Informoj: gresillon.org/printempas; Aliĝo: gresillon.org/aligho
Postaj staĝoj: gresillon.org/agendo




# En Germanio

Jen kelkaj gravaj eventoj, lingvokursoj kaj klerigsesioj de la germana sekcio de ILEI (AGEI) kaj Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg (ICH).

**februaro 16–18 Semajnfina Esperanto-kurso:** Semajnfina intensa lingvokurso: etaj grupoj laŭ niveloj A1-A2, B1-B2, lingva perfektigo kaj evoluigo de parolkapablo.

**februaro 23–25 81a GEA-Klerigseminario**: Instrukapabliga Irejnado.

**marto 05–09 Intensa kurso tutsemajna:** Bildungsurlaub „Esperanto" per Popolaltlernejo VHS Göttingen-Osterode kaj aldona semajnfina plilongigo. Tutsemajna intensa lingvokurso por komencantoj kaj parolemuloj, 8 instruhoroj tage, atestilo pri partopreno je la fino.

**junio 28 - julio 01 82a GEA-Klerigseminario:** instrukapabliga trejnado.

**julio 02–08 Internaciaj Esperanto-Kursoj (SEP1 - Somera Esperanto-Perfektigo)**

**julio 08–15 Internaciaj Esperanto-Kursoj (SEP2 - daurigo).** Eblas partopreni nur unu semajnon aŭ du.

**septembro 28 – oktobro 3: TORPEDO-13** (Pedagogiaj Tagoj, 83a Klerigseminario)

**novembro 09-11: Semajnfina Esperanto-kurso**

**decembro 14–16: 84a GEA-Klerigseminario kun Zamenhof-festo**

Pli da detaloj: http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=42117099

# En Irano

La 5a Irana Esperanto-Kongreso
Temo: *Lumigi Novajn Vojojn*

La 5-a Irana Esperanto-Kongreso (IREK-5); Aprilo 12-13, 2018 – Tehrano

Por historio, vidu: https://eo.wikipedia.org/wiki/Irana_Esperanto-Kongreso

# En Nepalo

Ekde la 26a de februaro 2018 ĝis la 9a de marto okazos la 2a speciala Himalaja Renkontiĝo en Nepalo. Tiu ĉi konsistas el busekskuro al diversaj interesaj lokoj, ne pro montgrimpado, do ĉiuj homoj povos partopreni senprobleme. Pli da partoprenantoj signife helpos al la evoluigo de la movado en tiu lando  Jasuo Hori rakontas: "Mi jam partoprenis pli ol 10 fojojn en la Renkontiĝo kaj multe ĝuis la belan pejzaĝon kaj la etoson".

Historio: https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Himalaja_Renkonti%C4%9Do



Foto: SMG el 2016, el vilaĝa elrigardejo centon da kilometroj for.

# En Pollando

La Internacia Majrendevuo okazos en du urboj, en Vroclavo kaj en Góra inter la 21a kaj 24a de majo. En Vroclavo okazos la Sesa Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj. Poste oni kune veturos al Góra kaj tie oni organizos Internacian Simpozion, ekskursojn, balojn, laborsesiojn ktp. Okazas diskutoj pri la okazigo de AMO-seminario en Góra, laŭ la modelo de la sukcesa AMO 34 en Vroclavo en 2017.





Scenoj el la kantado en la pli junaj kategorioj en 2017. Fotoj: SMG

En similaj datoj (majo 19-25) en Vroclavo okazos la 70a Kongreso de IFEF, nia fervojista Faka Asocio.

Pliaj informoj de: pomer@wp.pl aŭ wlib24@o2.pl



Unika kaj spontana muzika kunlaboro en la kvina festivalo: Kaŝi kun jOmO. Foto SMG en 2017

=======================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

## APREZOJ por la EKO-cirkuleroj:

- Tre estimata amiko; Unu plian fojon dankon pro viaj mesaĝoj kiujn mi legas kun plezuro. Ĝis Lisbono!
- Dankon pro via mesaĝo. Mi bone memoras mian unuan ILEI-konferenco kiam vi estis la Prezidanto kaj la sekvantaj jaroj kiam la estraro kunvenis en diversaj lokoj. Estas multaj mesaĝoj inter esperantistoj, sed tamen mi ĉiam legas tiujn de vi pri la grava laboro kiun vi faras pri AMO kaj aliaj aferoj.
- Nome de nia skipo en Radio Havano Kubo, mi tre dankas pro la sendita informo kiun ni ja uzos por diskonigi en la esperanto-elsendoj. Ni daŭre bonvenigas tiaspecajn raportojn. Bondezirojn kaj dankon pro la subteno al nia laboro.